# La 83-a KONGRESO
# de
# SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

**Temo de la kongreso**

**"EKONOMIA KRIZO.....**
**.... KAJ TIES PLURFLANKAJ POSTEFIKOJ"**

**Braŝovo**
**1-06.08.2010**

# La Espero

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.
Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.

L.L. Zamenhof

# Enhavo


| | |
|---|---|
| Bonveniga parolado de la prefekto de distrikto Braŝovo | 4 |
| Salutvorto de la urbestro de Braŝovo | 5 |
| Salutvorto de la prezidanto de SAT | 6 |
| Organiza Kongresa Komitato bonvenigas vin! | 8 |
| Salutvorto de prof. Mariana Ionescu, kolegio A. Ŝaguna | 9 |
| Salutvorto de la reprezentanto de EAR | 10 |
| Salutvorto de la transportsindikatoj | 10 |
| Resumo prelego: “Pri la rumana lingvo kaj kulturo”, Iosif Nagy | 11 |
| Resumo prelego: “Laborista movado en la 20-jarcenta Rumanio”, Doru Neagu | 11 |
| Resumo prelego: “Esperante pri kio, efektive?”, David Kelso | 12 |
| Resumo prelego: “Rasismo”, Jakvo Schram | 12 |
| Resumo prelego: “Ekonomia krizo en la koncepto de la dana verkisto kaj kosmologo Martinus” | 13 |
| Resumo prelego: “Tutmonda krizo, lokaj oferoj”, Cristian Sabau | 13 |
| Resumo prelego: “Sekvo pri Etikaj Bankoj”, Franjo Leveque | 14 |
| Resumo prelego: “Ĉu ni finance kapablus?”, Guy Martin | 14 |
| Klarigo pri nomoj de la salonoj | 15 |
| Interesaj vidindaĵoj en Braŝovo kaj ĉirkaŭaĵoj | 16 |
| **Programo** | **18** |
| Organiza Kongresa Komitato | 20 |
| Pri ni…la klubo “Amikeco”- Braŝovo | 21 |
| Utilaj informoj | 22 |
| Kultura programo: “La kalva kantistino”, E. Ionescu | 23 |
| Kultura programo: “La Karpata Cervo” | 23 |
| Kultura programo: Diana Nohit, 14j., poeziaĵoj | 24 |
| Kultura programo: la koruso de gimnazio nr. 25, Braŝovo | 25 |
| Kultura programo: “Kanzoneto”, asembleo de liceo J. Honterus, Braŝovo | 26 |
| Turisma programo: D 1, D 3, Braŝovo | 27 |
| Turisma programo: D 2, Bran-Raŝnov-Poiana Braŝovo | 28 |
| Turisma programo: D 4, Sinaia… | 29 |
| Turisma programo: T 1, Sibiu | 30 |
| Turisma programo: T 3, Sighisoara | 31 |
| Turisma programo: T 2, Bukureŝto | 32 |
| Turisma Programo: postkongreso, Delto de Danubo | 33 |
| Listo de aliĝintoj | 34 |
| Statistiko laŭ landoj | 35 |
| Dankojn | 35 |
| Vortareto | 36 |

# Salutvorto de la Prefekto de la Distrikto Braŝovo

„Veche cetate medievală", „puternic centru comercial şi economic al Transilvaniei", „ inima ţării", toate sunt descrierile succinte ale unuia dintre cele mai frumoase judeţe ale României- Braşovul.

Numeroasele particularităţi şi elemente de unicitate ale Braşovului: puternic centru istoric individualizat într-un oraş modern, ce a cunoscut o importantă dezvoltare economică, o zonă turistică consacrată, susţinută de o viaţă culturală activă şi de un relief unic, reprezintă motivul suficient şi necesar al asumării de către administraţia publică a misiunii de a transforma judeţul Braşov în cel mai important centru turistic al ţării, fără a neglija aspectele vieţii economice şi culturale ale zonei.



A găzdui aici, la poalele Tâmpei, cel de-al 83-lea Congres al Asociatiei Mondiale fara Frontiere reprezintă o onoare pentru noi şi suntem mândri că avem o nouă oportunitate de a promova peste hotare frumuseţile incontestabile ale Braşovului.

Tuturor participanţilor le urez o şedere plăcută şi mult succes lucrărilor acestui congres cu participanţi din 16 ţări ale lumii, care nu au nevoie de interpreţi ca să se înţeleagă între ei, deoarece folosesc o limba comuna, limba Esperanto.

Vă doresc să vă bucuraţi din plin de căldura ospitalitatii românesti!"

"Malnova mezepoka civito", "forta komerca kaj ekonomia centro de Transilvanio", "koro de la lando", ĉio ĉi estas mallongaj priskriboj de unu el la plej belaj distriktoj de Rumanio – Braŝovo.

La multnombraj apartaj ecoj kaj elementoj de unikeco de Braŝovo: forta historia centro en moderna urbo koninta gravan ekonomian disvolviĝon, fama turisma regiono subtenata de aktiva kultura vivo kaj de unika reliefo, estas motivoj por kiuj la publika administracio akceptis la devon transformi la distrikton Braŝovo en la plej grava turisma centro de la lando, sen neglekti la aspektojn de la ekonomia kaj kultura vivo de la regiono.

Gastigi ĉi tie, ĉe la malsuproj de la monto Tâmpa, la 83-an Kongreson de Sennacieca Asocio Tutmonda estas honoro por ni kaj ni fieras havi novan okazon promocii eksterlanden la nekontesteblan belecon de Braŝovo.

Al ĉiuj partoprenantoj mi deziras agrablan restadon kaj sukceson al la kongreso kun ĉeestantoj el 16 landoj, kiuj ne bezonas interpretistojn por interkompreniĝi ĉar uzas la komunan lingvon Esperanto.

Mi deziras al vi plene ĝui la varmecon de la rumana gastamo!

Prefekto de la Distrikto Braŝovo
Ion Gonţea



# Salutvorto de la Urbestro

Brasovul este un oras interetnic si intercultural, unde locuiesc, traiesc si muncesc impreuna in relatii prietenesti romani, maghiari, sasi, evrei, greci si alte etnii.

Intr-o astfel de comunitate, intelegerea reciproca si comunicarea intre vorbitorii de diverse limbi este f. importanta pentru prosperitatea locuitorilor.

Aceasta functioneaza perfect in orasul nostru si noi, brasovenii, am dori ca astfel de relatii sa existe si la nivel mondial.

Sunt sigur ca miscarea esperantista contribuie eficient la comunicarea

si colaborarea internationala si, in acest fel, sprijina pacea.

Doresc bun venit musafirilor nostri, sedere placuta in Brasov si mult succes lucrarilor congresului!



Braŝovo estas urbo interetna kaj interkultura, kie kune loĝas, vivas kaj laboras, en amikaj rilatoj, krom rumanoj, ankaŭ hungaroj, saksoj, grekoj, judoj k.a.

En tia komunumo, la interkompreniĝo kaj la kunlaborado inter diverslinvgvaj parolantoj ege gravas por la progreso kaj la prospero de la loĝantaro.


Tio ja bone funkcias en nia urbo kaj ni, la braŝovanoj, forte deziras ke tiaj bonaj rilatoj ekzistu ankaŭ je la monda nivelo.

Mi certas ke la Esperanto-agado efike kontribuas al la monda interkompreniĝo, kunlaborado kaj paco.

Bonvenon al niaj gastoj, agrablan restadon en Braŝovo kaj sukceson en la kongresaj laboroj!

Urbestro de Braŝovo
George Scripcaru

Karaj amikoj, karaj gastoj, estu bonvenaj!



Ĉi tiu kongreso estas iom festa kongreso. Por mi persone ĝi estas festo ĉar ĝi estas la 10-a kongreso kiun mi partoprenas. Por nia asocio ĝi estas festo ĉar… kiel mi plej bone diru tion? ....SAT-anoj venkis la diablon.

Jes, pli bone mi ne povas esprimi: SAT-anoj venkis la diablon, kiu estis multaj jaroj de financaj malfaciloj.

En la jaro 2003 mi iĝis prezidanto de Plenum-Komitato kaj konstatis ke SAT estis en terure malbona financa stato.Tio estis komenciĝo de multaj diskutoj en sino de P.K. por trovi elirvojon el la financa katastrofo al kiu ni konfrontiĝis. La Plenum-Komitato tuj komencis agadi por malplialtigi la ĝeneralajn kostojn kiujn la asocio havis.

Mi memoras la malfacilan momenton dum SAT Kongreso en Beogrado, kiam mi devis informi la membrojn, ke SAT staris antaŭ bankroto; kiam mi devis peti permeson ke, se vere necesos, SAT povu maldungi sian ĝeneralan sekretarion, kiu estis dungito de SAT, aŭ eventuale vendi la sidejon en av. Gambetta.

La solidareco de niaj membroj kaj LEA-oj estis giganta kaj ĉiun monaton ni trovis la monon por pagi nian dungiton, nian karan amikon Kreŝo Barkoviĉ. En av Gambetta daŭre troviĝas nia sidejo. Jes ni venkis la diablon!

La SAT kongreso en Parizo donis grandan esperon. Montriĝis, ke aliĝis al SAT pluraj junaj aktivuloj. Dum mi forlasis Beogradon kun tre peza koro, mi forlasis Parizon kun koro plena de espero.



Kiam en 2008 Kreŝo adiaŭis SAT kiel dungito, la franca ŝtato havis malagrablan surprizon por ni. Pro la fakto ke ni ne anstataŭis Kreŝon, kiu emeritiĝis post dekoj da jaroj de sindona laboro, ni devis pagi gigantan punon ĉar laŭ la franca ŝtato tio egalas al maldungo, forpreno de laborloko.

En 2009 kunvenis en Milano SAT alie strukturita.

SAT kiu ne plu havas dungiton, sed plene funkcias per la laborforto de volontuloj. Tiuj volontuloj estas plejparte junaj homoj kaj homoj kun junaj koroj.

Kreiĝis “Eldona Fako Kooperativa” kiu prizorgas la novajn eldonaĵojn de SAT..... ne nur librojn sed flugfoliojn, glumarkojn, T-ĉemizojn kaj tiel plu.

La sekretaria laboro estas de duonjaro farita de Vinko Markovo, la librotenadon daŭre prizorgas Tereza Sabatier kaj la revuoj de SAT estas nun en la manoj de redaktoskipo kiu zorgas, ke ĉiun duan monaton alvenu ĉe vi via Sennaciulo kaj jare via Sennacieca Revuo.

Do, ĉiuj problemoj kiuj povis estiĝi post la emeritiĝo de Kreŝo solviĝis.

Ni nun estas en la belega urbo Braŝovo por partopreni la 83-an SAT kongreson kaj certe vi volas scii kiel SAT fartas nun?

Dankon, SAT fartas bone!

Ofte mi retmesaĝis al Tereza Sabatier aŭ rekte mi petis al ŝi kiel evoluas niaj financoj. Kaj fine ĉi jare ŝi povis diri, ke ni laŭiras bonan vojon.

Tereza grave malsaniĝis antaŭ kelkaj monatoj, sed neniam ŝi forlasis sian postenon. Ŝi estas mirinda membro de nia asocio.

SAT kongreso en Braŝovo estas nova epoko por SAT. Dum ĉi tiu kongreso, ni

denove povas fari planojn pri kiamaniere plifortigi SAT, kiamaniere propagandi nian asocion.

Kiom da materialo necesas por ke vi povu varbi por SAT?

Kvankam modeste, ni denove havas monon por plifortigi SAT.

Jes, ĉi tiu kongreso estas malmultnombra. Certe ne kulpas pri tio la OKK, kiu ek de la unua tago kunlaboris kun P.K. kaj laboregis por prezenti ne nur belan lokon por niaj laborkunsidoj kaj debatoj, sed ankaŭ mirinde bonajn turismaĵojn por ke ni povu lerni pri Rumanio, pri ĝia kulturo kaj homoj.

Plej verŝajne plejmulte da esperantistoj bezonis sian monon por saluti Fidel kaj Raul en Kubo kaj nu jes plejmulte da esperantistoj estas laboristoj kiuj devas kalkuli la monon kiun ili elspezas?

Tamen nia kongreso estas grava, ĝi estas la bazo de SAT. Ĝi donas la eblon al la membroj esprimi opiniojn pri la funkciado kaj l' estonto de SAT. Grava paŝo estas, ke vi ĉiun trian jaron elektas taŭgan Plenum-Komitaton, sed same grave estas, ke vi partoprenas al en la ĉiutaga vivo de SAT.

Evidente la reto donas al ni multegajn eblojn kaj pere de ĝi multaj membroj konsilas kaj informas nin.

Ĉi tiu SAT Kongreso en Braŝovo donas multe da atento al la turisma flanko kaj post semajno vi pliriĉigos viajn konojn kaj scios pli pri ĉi tiu regiono.

Estonte ni incite petas al la OKK de SAT kongreso aparte atentu ke la turisma flanko de niaj kongresoj estu interesa kaj riĉa pri enhavo.

Sed SAT ne estus SAT se ni ne havus nian jarkunsidon, kiu okazas dum la 12 horoj de la laborkunsidoj.

SAT ne estus SAT se ni ne havus niajn diskutojn kaj interŝanĝojn de ideoj.

SAT ne estas nur esperanto-asocio, sed kleriga, eduka kaj kultura asocio, ĉar laŭ tiuj gravaj pilieroj la SAT kongreso estas organizita.

En St Nazaire ni havis sindonan membron, kiu bedaŭrinde tro juna mortis. Lia nomo estas Ferdi Vince.

Mi daŭre memoras la mesaĝon kiun mi ricevis de Franjo Leveque:

**"Nia amiko Ferdi VINCE forpasis ĉi nokte. Li mankas kaj mankos kiel granda kverko en la arbaro de niaj sentoj, rilatoj kaj konoj.**

**Adiaŭ amiko, ni amis vin."**

Ferdi estis ekzemplo por ni ĉiuj. Brila esperantisto, instruisto, mondcivitano kaj batalanto en SAT. Li ŝategus viziti Rumanion kaj precipe Braŝovon, li ŝategus ĉeesti nun kune kun ni. Tial oni dediĉis la nunan kongreson al lia memoro.

Estas la tempo nun oficiale malfermi la 83-an SAT kongreson en Braŝovo. Ni havas multe da laboro kiel ĉiam, sed nepre ne forgesu ĝuegi vian restadon.

La etoso estu amika, nia laboro fruktodona, la turismaj partoj instruaj kaj agrablaj kaj la vino bongusta.

Vivu SAT. Jakvo Schram prezidanto Plenum-Komitato de SAT

# La Organiza Kongresa Komitato bonvenigas vin!



Koran kaj varman bonvenon al la internacia renkontiĝo Braŝovo 2010 karaj kongresanoj, eksterlandaj kaj rumanaj!

En ĉi tiuj tagoj nia urbo festas 755 jarojn de atestita ekzisto kaj ni havas la honoron, ke nia aranĝo - la 83-a SAT-kongreso - estu parto de la programo de tiuj festaj tagoj de Braŝovo.

Krom multnombraj gastoj kiuj vizitas nun Braŝovon ni, la esperantistoj el 16 landoj, certe donos al la ekstera publiko bildon de entuziasma, vigle vivanta movado, kies internacia etoso de tiu semajno oni ŝuldiĝas al ĉi-tiu mirakla rimedo por harmonio kaj interkompreniĝo inter popoloj - la paclingvo Esperanto.



Estas la unua SAT-kongreso kiu okazas en Rumanio kaj viaj rumanaj samideanoj estas fieraj pro la honoro organizi ĝin.

La membroj de la Organiza Kongresa Komitato kaj la multnombraj helpantoj deziras oferti al Vi en Braŝovo neforgeseblajn memoraĵojn.

Kunlaborante por la organizado de tiu aranĝo, ni havis la plej bonan okazon renovigi la interŝanĝojn inter la rumanaj esperantistoj kaj kune pretigi por vi riĉajn programojn - fakan, kulturan kaj turisman.

Ni esperas, ke nia entuziasmo, klopodo kaj deziro por sukcesi superos la eventualajn mankojn.

Nome de la Organiza Kongresa Komitato mi deziras al vi agrablan restadon en nia festanta urbo kaj mi certas, ke la beleco de nia lando kaj la varmeco de la rumana animo allogos Vin.

**Estu bonvenaj vi, ĉiuj !**

Rodica Todor
OKK - prezidanto




# Salutvorto de Prof. Mariana Ionescu

Karaj geamikoj,

Ni ege ĝojas, ke vi elektis la Nacian Kolegion "Andrei Ŝaguna" por la 83-a kongreso de SAT !

La honoro esti gastigantoj preskaŭ egalas la fieron prezenti al vi parton de nia kulturo, de nia historio.

Pro la ideoj de profunda humanismo de Esperanto, la profesoroj kaj gelernantoj de tiu kolegio estas konvinkitaj, ke multaj pordoj malfermiĝos al vi. La interŝanĝoj, la kono de diversaj kulturoj kaj popoltradicioj, la kono de la geografia kaj socia medio, estas la plej taŭgaj agmanieroj integriĝi en la universalan mondon kaj evidentigi la dezirojn por paco kaj interkompreniĝo.




Esperante ke Braŝovo restos por vi gvidosigno malfacile forgesebla, kun amikeco, admiro kaj respekto ni kore bonvenigas vin kaj deziras al vi sukceson en ĉio, kion la espero je plia bono instigas vin entrepreni.

Tio ege taŭgas al niaj ĉefaj konceptoj kiujn ni ĉiam subtenas: la Bono, la Vero, la Belo.

Prof. Mariana Ionescu

Direktorino de la Nacia Kolegio Andrei Ŝaguna

# Salutvorto de la reprezentanto de EAR



Bonan alvenon en Rumanion, okaze de la 83-a Kongreso de SAT! Mi salutas vin flanke de la Esperanto-Asocio de Rumanio. Por la rumanaj esperantistoj ĉi tiu kongreso estas grava evento kaj ni tre ĝojas vidante kiom da partoprenantoj venis de eksterlande kaj de Rumanio. Vi havos la okazon koni nian agadon! En Rumanio, la esperantista movado estis malpermesata dum la komunista diktaturo, kvankam en aliaj ekskomunistaj landoj (Pollando, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Bulgario kaj Germanio), dum la sama periodo, ĝi bone disvolviĝis. Post la revolucio de decembro 1989 ni komencis reorganizi nian movadon tiom, kiom permesis al ni la novaj ekonomiaj kondiĉoj. Ni esperas, ke vi sentos bone en Rumanio inter esperantistoj kaj ke tiu kongreso okazos en bonaj kondiĉoj por vi.

Ni ankaŭ esperas, eĉ estas konvinkitaj, ke la belegaj pejzaĝoj de Rumanio plaĉos al vi kaj vi rememoros plezure pri ĉi tiuj tagoj. Mi gratulas la organizantojn, kiuj multe laboris por ke ĉio estu en ordo !

d-ro Marian Constantinescu
reprezentanto de Esperanto-Asocio de Rumanio



# Salutvorto de la transportsindikatoj en Rumanio



Pro la fakto ke la 83-a kongreso de SAT okazas por la unua fojo en Braŝovo, ni, ĉiuj esperantistoj de Rumanio, sed ankaŭ simpatiantoj de la internacia lingvo, multe klopodis por organizi ĉi tiun gravan eventon por la esperantista movado, kvankam ni ne estas multaj.

En la hodiaŭa mondo, kie la ekonomiaj kondiĉoj, la politiko, la malriĉeco, ofte la milito, streĉigas la homaron kaj influas negative nian vivon, ni bezonas "fenestron" tra kiu ni rigardu al pli bela mondo, kiun regas la bonaj ideoj. Tia mondo estas Esperantujo, kies lingvo helpas la homojn pli facile kaj sendiskriminacie interkomuniki.

En Braŝovo estas tre bonaj kondiĉoj por fakaj kongresoj, ĉar la urbo estas grava fervojista centro en Rumanio kaj la naturo invitas nin ekskursi en la ĉirkaŭaĵoj aŭ en la proksimaj historiaj lokoj.

Ĝuu la belegajn vidindaĵojn de nia lando kaj forgesu, por almenaŭ unu semajno, la malbonon, la malbelecon aŭ ĉion, kion vi ne ŝatas.

Sukceson al via kongreso!

Florin Dobrescu
Prezidanto de la Nacia Konfederacio de Sidikatoj de la fervojtransportistoj: "FERVOJO"
Vicprezidanto de Nacia Sindikata Konvencio "CNSRL- Frația"

# Pri la rumanaj lingvo kaj kulturo



Rumanio troviĝas en la sud-orienta parto de Eŭropo, sur la paralelo de 45º, kiu pasas je 70 km norde de Bukareŝto, kaj sur la meridiano orienta de 25º, (mezvoje inter la Atlantiko kaj la Uraloj) kiu pasas je 90 km okcidente de Bukareŝto. La lando etendiĝas ĉirkaŭ 515 km de nordo al sudo kaj 720 km de oriento al okcidento. Ĝia surfaco estas de 237.500 km². Je la popolnombrado de marto 2002 rezultis 21.680.974 enloĝantoj.

La rumana apartenas al la familio de latinidaj lingvoj, kies orientan branĉon ĝi konsistigas kune kun la dalmata (lingvo kiu malaperis fine de la 19-a jarcento). Fontanta el la greftado de la latina sur traka-daka bazo, izolita meze de la slavaj popoloj kaj ligita kulture kaj religie al la orienta parto de la Romia imperio, la rumana evoluis en malsama maniero ol la ceteraj latinidaj lingvoj kaj restis pli konservativa. Tamen, ĝi havas multajn similecojn kun ili, precipe kun la itala, tiel ke iuj specialistoj konsideras, ke ĝi apartenas al la apenina-balkana grupo de la latinidaj lingvoj.

Conf. dr. ing. Iosif Nagy



# Laborista movado en la 20-jarcenta Rumanio

Proletaro disvolviĝis sur la teritorio de la nuna Rumanio en Bukureŝto, la danubaj haven-urboj Galați, Brăila kaj Turnu Severin, en minejaj basenoj de Banato, de la Ĵi-rivera valo, kaj en urboj laŭlonge de la fervojo Temeŝvaro-Arado-Oradea. Por defendi iliajn ekonomiajn kaj socialajn rajtojn oni fondis sindikatojn kaj laboristajn partiojn. Antaŭ la Unua Mondmilito dominis la Social-Demokrata Partio Rumana. Inter la mondmilitoj la laboristan movadon disputis du ĉefaj partioj: Social-Demokrata Partio Rumana kaj la Komunista Partio de Rumanio. Pro la instaŭrado de la soveta domi-nado en la Orienta Eŭropo – inkluzive en Rumanio – la Komunista Partio de Rumanio asimilis la Social-Demokratan Partion Rumanan sub la nomo de Laborista Partio Ru-mana (1948). En 1965 la reganta partio ŝanĝis la nomon je Komunista Partio Rumana (estrita de N. Ceauşescu, 1965-1989).

Doru Neagu, Slatina

# Esperante pri kio, efektive ?



La tiel nomata 'neŭtrala' Esperanto-movado insistas ke ili ne havas ideologion: ili estas neŭtralaj ('neŭtraj' se vi preferas) pri demandoj religiaj, politikaj kaj sociaj. Ilia himno, 'La Espero', tamen, deklaras subtenon al paco, tutmondeco, homa frateco, egaleco kaj simile. 'D-ro Esperanto' evidente esperis je io kaj li konstante insistis ke la internacia lingvo estas nur veturilo por 'la interna ideo', tio mem estante purigita versio de lia homaranismo, kio dividas iujn ideojn kun sennaciismo. David Kelso esploros la ideologian implicon de la Esperanto-ideo, kaj en 'neŭtraleca' kunteksto kaj en sennacieca.

prof. David Kelso



# Rasismo

La prelego „Rasismo" portas nin tra vivhistorio de aŭtoro pri maltoleremo inter najbaraj urboj kaj vilaĝoj, pri manko de solidareco inter kolegoj kaj laborantoj en la sama metio. Ni iras la vojon per kiu homoj de sama socia tavolo povas malami unu la alian, simple pro deveno aŭ pro timo ke tiu alia, tiu strangulo, tiu fremdulo klopodas akapari lian postenon.

**"Ne per timigi, sed per ami reciproke, la vivo koheras, kunteniĝante nin, helpante nin kunhavigi"** skribis antaŭ preskaŭ 2000 jaroj la grava filozofo Seneko en siaj „Dialogoj"

La demando en la prelego estas: Ĉu ni sukcesis? Ĉu ni venkis la malamon? Ĉu ni nun en la 21-a jarcento kapablas esti komprenemaj, toleremaj? Aŭ ĉu ni ĉiuj estas kaj restas latentaj rasistoj?

La preleganto iom skize revenos al tempo de faŝismo en Italio kaj fikondutoj de Hitler kaj liaj subtenantoj por ke ni komprenu, ke la nunaj politikaj partioj de ekstremdekstro uzadas saman retorikon kiel la tiamaj diktatoroj el Italio kaj Germanio.

La prelego ne alportas iun oraklan veron, sed precipe demandojn, kiujn ni devas fari al ni mem. La celo de la prelego estas alvoki debaton inter la ĉeestantaro. La plej grava demando estas: Ĉu ni havas la rajton toleri rasismon. Kaj due: ĉu ni, progresemuloj, havas respondojn al la retoriko de ekstremdekstro.

Post la prelego ni prezentos debaton inter **Rodica Todor** kaj **Jakvo Schram** pri ciganoj kaj iliaj rakontoj…

Jakvo

# Ekonomia krizo en la koncepto de la dana verkisto kaj kosmologo Martinus



Enkonduko: la teorio de la profesoro Nicholas Boyle pri la ekonomiaj krizoj.

La ĉefaj verkoj de Martinus kaj lia vidpunkto rilate al la nuna malĝusta ekonomia sistemo. Laŭ Martinus la nunaj teraj homoj troviĝas sub la vivkondiĉo de la besta regno kaj de la homregno. La povo de la mono konkeras kaj influas ĉion, tiel ke preskaŭ ĉio estas aĉetebla. Tial la vivo de la homo fariĝis batalo por mono, per kiu oni akiras la potencon kaj la respekton. Sed ankaŭ la ŝtata potenco daŭre evoluas… La komerca mondo estas rafinita batalo por valoroj, ĉar "la komerca principo" fariĝis la fundamento en la tuta terhoma sinkonserva instinkto. La rilatoj inter la mona potenco kaj la ŝtata potenco kaj kiel la terhoma socio subfosas sin mem. Kiu kulpas kaj kiel povas ŝanĝiĝi la situacio?

Ĉu ekzistas solvo de la nuna situacio, ĉu ni povas esperi al pli bela estonto por la tera homaro?

prof. Mihai Trifoi



# Tutmonda krizo, lokaj oferoj



Ĉi tiu komunikaĵo prezentas kelkajn aspektojn komunajn al la ekonomiaj krizoj de 1929-1933 kaj 2008-2010 kaj la karakterizaj trajtoj de ĉi tiuj krizoj en Rumanio. Oni emfazas precipe la manieron laŭ kiu la politikaj gvidantoj el diversaj landoj provis eligi la proprajn ŝtatajn ekonomiojn el la krizo. Aŭ kiel – kaze de Rumanio – trovis la plej facilan vojon tiucele ĵetante la efektojn de la krizo sur la ŝultrojn de la propra popolo.

Cristian Sabău

# Sekvo pri "Etikaj bankoj"

Mi kolektis pli da informoj pri "Etikaj bankoj" kaj aliajn similajn iniciatojn kaj deziras konigi la enhavon de la konstituata dosiero pri la afero.

Dum la jaro 2010/2011, evoluis (os) la kreado de BEE (Banka, Etika, Eŭropa). Ankaŭ samalcelis la Itala Banka Popola Etika kaj la hispana FIARE kiel la "NEF".

La NEF (Nova ekonomio frateca) - etika franca financa societo kun aprobo de Franca Banko - iĝos banka firmao por grupiĝi en 2012 kun la BEE kaj fariĝi "Eŭropa kooperativo". Tiu kooperativa statuto novaperontos en banka fako.

Kun Tereza Sabatier, kasistino de SAT, ni studis la eblecon membriĝi en etikaj bankprojektoj kaj proponos konkretajn paŝojn al la membroj de SAT.

Cele al pliankriĝo en la konkreta vivo de la "BEE", ni proponis esperantigi "manifeston" kaj "regularon" uzotaj en la internaciaj kunvenoj de "BEE".

Franjo



# Ĉu ni finance kapablus?

Ĉu ni finance kapablus eldoni libron aŭ filmon, aŭ dungi iun ? Ĉu nia asocio lamas aŭ pliviglíĝas ?

Gravaj demandoj por iu ajn asocio, ĉu ne ?

Dum la 82a kongreso de SAT 2009 en Milano, gvidrezolucio estis aprobita. Interalie, la kongreso "petis la plenum-komitaton zorgi, ke en la venonta kongreso estu antaŭvidita ebleco organizi klerigsesion pri financaj aferoj".

Tial, mi bonvolas gvidi forumon pri tiu temo dum la Braŝova kongreso.

Unue, mi klarigos kial ekzistas kontoj kaj aparte por la asocioj. Klerigo de asocianoj gravas por ke financaj aferoj restu nur iloj je dispono de politikaj decidoj kaj ne male. Poste, mi prezentos la ĉefajn dokumentojn, kiuj enhavas kontojn kaj kelkajn klarigojn pri ilia funkciado. Fine, mi proponos ŝlosilojn por observi kaj kompreni la plej gravajn konterojn. Laŭ la demandoj de la partoprenantoj, mi adaptos la prezentadon.

Guy Martin

## Ferdi Vince (1940-2009)



Estis unu el tiuj, kiuj kreis en San Nazero ekologian grupon, esperantan grupon, liberpensulan grupon kaj "Esperanto 44", tuj post la 40-a SAT-amikara kongreso, en 1985.

Li ĉiam diris, ke li lernis kaj lerte instruis esperanton nur por uzi ĝin laŭ siaj liberaj ideoj.

Fama esperantisto, mondcivitano, li diskrete forpasis la 19-an de aprilo 2009, tuj post la Paŭla SAT-amikara kongreso.

## Eugeno Lanti (pseudonimo) - Eugene Adam (1879-1947)



Naskiĝis en eta normanda vilaĝo Nehou(departamento Maniko). Li iĝis lignaĵisto, laborante en Rueno kaj Parizo. Kiel flegistsoldato li trapasis la unuan mondmiliton kaj tiam interesiĝis pri Esperanto.

Ekde 1919 li iĝis redaktoro de "Esperantista laboristo" en Parizo.

Li iniciatis en 1921, en Prago, la fondiĝon de SAT (Sennacieca Asocio Tutmanda), kies prezidanto estis ĝis 1933. Samtempe li fariĝis redaktoro de "Sennacieca Revuo" subskribante je la pseudonimo Lanti.



De 1936 ĝis 1947 li vojaĝis tra la mondo en Eŭropo, Azio, Aŭstralio, Ameriko… Lanti mortis en 1947 en la urbo Meksiko.

## Petro Levi

Naskita en Parizo la 5-an de majo 1926, estas esperantista verkisto kaj sindikatisto aktiva en la SAT-movado.



Esperanton li eklernis dum somero 1937 kun sia patro, kaj poste daŭrigis la studadon sola, ĉefe ekde 1945. Tiam li serĉis esperarantistan medion por praktiki la lingvon. Li aliĝis al SAT en 1946, post vana provo ĉe la parizaj neŭtralaj esperantistoj, kiuj obstinis paroli nur franclingve.

Petro Levi estis prezidanto de Plenum-Komitato de SAT inter 1972 kaj 1981. Nun li daŭre aktivas kiel redaktanto en la redaktoskipo de Sennaciulo kaj Sennacieca  Revuo kaj estas nemalhavebla konsilanto al ĉiuj membroj de SAT



**Domo de la Konsilantaro** -
Nuntempe ĝi gastigas La Muzeon de Historio
- Placo de la Konsilantaro n-ro 30.
- Programo, de mardo ĝis dimanĉo (inkluzive): 10h00-18h00



**Domo de Mureŝanoj** –
Muzeo kiu atestas la kontribuon de la familianoj Mureŝanu je la kultura vivo de Braŝovo.
- Placo de la Konsilantaro n-ro 25.
- Programo, de mardo ĝis sabato: 9h00-15h00



**Rumana Ortodoksa Katedralo** -
konstruita en la fino de la XIX-a jarcento.
Estas malfermita dum la festotagoj.
La vizito estas senpaga.



**Greka Preĝejo "La Sankta Triunuo"**
- konstruita en la jaro 1787.
Oni povas viziti ĝin tage, 7h00-18h00; en la preĝaj tagoj, ĝis la 20h00.





**La eta fortikaĵo "Ĉetate"** -
konstruita en la XII-a jarcento, kiel parto de la fortika sistemo de la urbo. Nuntempe estas turisma punkto - restoracio kaj teraso kun belega panoramo.

**Arta Muzeo**, troviĝas en konstruaĵo starigita en la jaro 1902, en la neobaroka stilo. Enhavas reprezentativajn laboraĵojn de la plej prestiĝaj rumanaj artistoj, grupigitaj en reala Nacia Galerio. Ekzistas aparta sekcio de la universalaj famaj artistoj. Subteretaĝe troviĝas valora ekspozicio de dekoracia arto, enhavanta malnovajn aĵojn de Azio kaj Eŭropo.
- Bulevardo de la Herooj, n-ro 21.
- Programo, de mardo ĝis dimanĉo: 10h00 - 18h00.



**Etnografia Muzeo**, tre proksime de la Arta Muzeo, en la sama konstruaĵo. Enhavas reprezentativajn eksponaĵojn por ĉiuj etnioj de la distrikto Braŝovo.
Programo, de mardo ĝis dimanĉo: 10h00 - 18h00.

**Nigra Preĝejo,**



unu el la plej interesaj konstruaĵoj en gotika arkitekturstilo en nia lando, kun impresaj dimensioj. La konstruado komencis sur la sama loko de romiana baziliko en 1385 kaj finiĝis post cent jaroj. La incendio de 1689 multe damaĝis la preĝejon (de tie venas ĝia nomo). Kiel historia monumento, la Nigra Preĝejo impresas interne per valoraj kolektoj de orientaj tapiŝoj de la XVI-a kaj XVII-a jarcentoj kaj per grandioza orgeno, kun 4.000 tuboj; ekstere ĝi impresas per la beleco de la arkitektura ĉirkaŭornamo, portaloj kaj statuetoj troviĝantaj sur ĝiaj muroj.

Programo, de lundo ĝis dimanĉo: 10h00-17h00



**Pordego Sankta Ekaterina,**

konstruita en la jaro 1559, estis unu el la gravaj enirejoj en la fortikaĵo. Hodiaŭ gastigas la Distriktan Filion de la Unio de la Rumanaj Arkitektoj. Estas vizitebla nur ekstere.



**Pordego de Schei (Skej),**

proksime de la Pordo Ekaterina, estis konstruita en la XIX-a jarcento kaj reprezentas monumenton de klasika arkitekturo.





**Hebrea Sinagogo,**

belega konstruaĵo, str. Poarta Schei nr.27



**Romiana-Katolika Katedralo,**

unu el la plej malnovaj konstruaĵoj de la urbo, konstruita inter 1776-1782 en baroka stilo. Str. Muresenilor, nr. 21



**Poiana Brasov**

Ripoz- kaj kuracloko permanenta, Poiana Brasov, situata 13 km for de Braŝovo, en la montaro Postavarul, estas la plej fama ripozloko por la vintraj sportoj en Rumanio kaj, samtempe, grava turisma centro internacia.

## Sabate 31.07.2010

| | | |
|---|---|---|
| **10h00-23h00** | **Akceptejo** | Akcepto de la partoprenantoj |
| **17h30-18h30** | **H. Coroana** | Ĥoruso Franjo Leveque-Salono et.1 |
| **20h30-...** | **H. Coroana** | Interkonatiĝa vespero-Salono por kunvenoj, et. 1 |

## Dimanĉe 01. 08. 2010

| | | |
|---|---|---|
| **09h00-12h00** | **Salono Ferdi Vince** | Solena malfermo ( "Andrei Ŝaguna") |
| **10h15-10h45** | **Kongresejo** | 30` paŭzo por komuna fotado |
| **14h00-15h00** | **Salono Ferdi Vince** | PK-ĜK – private |
| **15h00-16h00** | **Salono Petro Levi** | Ekologiisma Frakcio |
| **15h00-16h00** | **Salono Eŭgeno Lanti** | Kunveno kun perantoj - private |
| **13h30-16h00** | **D 1 -ekskurso** | **Braŝovo, ĉiĉeronado tra la urbo (1)** |
| **16h00-22h30** | **D 2 -ekskurso** | **Bran - Raŝnov - Poiana Braŝovo** |
| **17h30-18h30** | **H. Coroana** | Ĥoruso Franjo Leveque-Salono, et.1 |
| **19h30-22h30** | **Restoracio** | **Poiana Braŝovo - komuna vespermanĝo** |

## Lunde 02. 08. 2010



| | | |
|---|---|---|
| **09h00-12h00** | **Salono Ferdi Vince** | **Unua laborkunsido** |
| **14h00-15h00** | **Salono Ferdi Vince** | **Socia forumo 1** (Rumanio - Sindikatoj) |
| **15h15-17h45** | **D 3 - ekskurso** | **Braŝovo, ĉiĉeronado tra la urbo (2)** |
| **15h15-16h15** | **Salono Ferdi Vince** | LEA-komitato |
| **15h15-16h15** | **Salono Eŭgeno Lanti** | Pacista Frakcio |
| **15h15-16h15** | **Salono Petro Levi** | Eldona Fako Kooperativa |
| **16h30-17h30** | **Salono Ferdi Vince** | PorEsperanta Fako |
| **16h30-17h30** | **Salono Eŭgeno Lanti** | Komunista Frakcio |
| **16h30-17h30** | **Salono Petro Levi** | Liberecana Frakcio |
| **17h45-18h45** | **Salono Ferdi Vince** | JongSoo AN, Koreio pri: "Kunlaboro inter aktivistoj" |
| **20h30-21h30** | **Salono Ferdi Vince** | Kultura nacia vespero |

## Marde 03. 08. 2010

| | | |
|---|---|---|
| **09h00-12h00** | **Salono Ferdi Vince** | **Dua laborkunsido**; kvar temoj anoncitaj; |
| **09h00-10h15** | **Salono Petro Levi** | Guy Martin - "Kontoj en asocioj". |
| **09h00-10h15** | **Salono Ferdi Vince** | Vinko Markovo - "Disvendoreto de la kooperativo" |
| **10h30-12h00** | **Salono Petro Levi** | Franjo Leveque - "Etikaj bankoj - |
| **10h30-12h00** | **Salono Ferdi Vince** | Jakvo Schram - "SAT kaj pacaj agadoj" |
| **14h00-15h00** | **Salono Ferdi Vince** | **Socia forumo 2**, conf. dr. ing . Iosif Nagy, Rumanio "Rumanaj lingvo kaj kulturo" |

| | | |
|---|---|---|
| **15h15-17h00** | **Salono Ferdi Vince** | **Socia forumo 3,** Jakvo Schram, Belgio + Rodica Todor, Rumanio "***Pri rasismo***" |
| **17h15-18h15** | **Salono Ferdi Vince** | **Socia forumo 4,** Doru Neagu**,** Rumanio "Laborista movado en Rumanio dum la 20-a jarcento" |
| **20h30-21h30** | **H.Coroana** | Ĥoruso Franjo Leveque-Salono et.1 |

## Merkrede 04. 08. 2010

| | | |
|---|---|---|
| **08h00-19h00** | **T 1 - ekskurso** | **SIBIU, la urbo de Andreo Cseh** |

## Ĵaŭde 05. 08. 2010

| | | |
|---|---|---|
| **09h00-12h00** | **Salono Ferdi Vince** | **Tria laborkunsido**: bilanco pri labor grupoj |
| **14h00-15h00** | **Salono Ferdi Vince** | **Socia forumo 5**, prof. David Kelso, Britio "Esperante pri kio, efektive?" |
| **15h15-16h15** | **Salono Ferdi Vince** | **Socia forumo 6**, prof. Mihai Trifoi, Rumanio "Ekonomia krizo en la koncepto de la dana verkisto kaj kosmologo Martinus" |
| **16h30-17h30** | **Salono Ferdi Vince** | **Socia forumo 7,** Cristian Sabau, Rumanio "Tutmonda krizo!...lokaj oferoj! |
| **17h45-18h45** | **Salono Ferdi Vince** | ***Teatraĵo, prezentas la teatro "E. Ionesco"-Slatina*** |
| **19h00-22h30** | **rest. "La Karpata Cervo"** | **komuna vespermanĝo kune kun *spektaklo de popoldancoj*** |



## Vendrede 06. 08. 2010

| | | |
|---|---|---|
| **09h00-12h00** | **Salono Ferdi Vince** | **Kvara laborkunsido** |
| **12h00-12h30** | **Salono Ferdi Vince** | Prezento de la sekvonta SAT Kongreso, Sarajevo |
| **Fermo de la kongreso** | | |
| **13h30-17h30** | **D 4 -ekskurso** | **SINAIA, Kastelo Peleŝ** |
| **18h00-19h00** | **Prejmer** | ***Kultura internacia vespero// infankoruso "Kanzonetta"*** |
| 20h45-21h30 | H. Coroana | **Adiaŭa vespero-"Fina konkludo"-** |
| **libera diskuto, Salono por kunvenoj,** | | **H. Coroana** |
| 21h30-22h30 | **H. Coroana** | **Kantado gvidata de Franjo Leveque** |

# Organiza Kongres-Komitato



Rodica TODOR
prezidanto
turisma programo
+40 722 792 849

Rada VLAICA
sekretario kaj
administraj aferoj
+40 729 558 171





dr.Cristina ALDEŜIU
kasisto
sanaj aferoj
+40 730 369 389

Ileana CADAR
libreto
organizaj aferoj
+40 729 163 596







Gabriella TIBULEAC
kultura programo
+40 726 332 009

Mara TROFIN
kultura programo
+40 741 209 455



Franjo kaj Guy
faka programo
libroservo
+33 676 275 178




dr. Maria-Elena COCUZ
sanaj aferoj
+40 745 165 201





Mariana LIPA
libreto
organizaj aferoj
+40 722 580 325

# Pri ni....la klubo "AMIKECO", Braŝovo



Kvankam la internacia lingvo Esperanto havas tre malnovan heredaĵon en Rumanio (ĝi estis uzita jam komence de la pasinta jarcento), pri organiza asocio oni povas paroli nur post la sociaj kaj politikaj ŝanĝoj kiujn la Revolucio de decembro 1989 iniciatis. La 14-an de septembro 1991 fondiĝis la Rumana Esperanto Fervojista Asocio(REFA), apartenanta al IFEF. Nuntempe ĝi havas kvar filiojn en Braŝovo, Bukureŝto, Sibiu kaj Galati.

Komence de januaro 2002, oni inaŭguris en Braŝovo, kadre de la Hospitalo por fervojistoj, la unuan esperantan klubon, kiu ekde februaro 2005 baptiĝis "Amikeco" kaj en 2007 en Bukureŝto stariĝis E-klubo "La fervojisto", enkadre de Ministerio pri transportado.

La membroj de REFA partoprenas ĉiu-jare la internaciajn kongresojn de IFEF kaj de la aliaj esperantaj organizoj.

La vigla klubo "Amikeco" organizis plurajn aranĝojn naciajn kaj internaciajn: jarajn kunvenojn, karnavalojn kaj jam tradician VISE(Vintra Internacia Semajno por Esperantistoj)-ĉiam la lastan semajnon de februaro.Kadre de la semajnaj renkontiĝoj de niaj klubanoj oni instruas Esperanton, oni akceptas eksterlandajn gastojn kiuj prelegas pri iliaj landoj kaj kluboj, oni organizas komunajn ekskursojn aŭ oni babiladas ĉe glaso da biero, ĉiam utiligante ĉi-tiun mirinde simplan kaj efikan komunikilon…la internacian lingvon Esperanto!



Rodica Todor
prezidantino de REFA, Prezidantino de IFEF,
prezidantino de la E-klubo "Amikeco"

| Mihaela MARCU | akcepto<br>gastigado<br>organizaj aferoj | Constantin MARCU |
|---|---|---|
| +40 722 288 393 | | +40 722 619 127 |





Loka trafiko: en Braŝovo trafikas aŭtobusoj kaj trolebusoj. Oni nepre devas anticipe aĉeti biletojn (3 Leoj, du vojaĝoj). La giĉetoj troviĝas preskaŭ en ĉiu bushaltejo.

## Bankoj kaj monŝanĝejoj

Internaciaj valutoj estas konverteblaj (laŭ ĉiutaga kurso).

| | | |
|---|---|---|
| 1 EŬRO | = proksimume | 4,2 Leoj |
| 1 USD | = " | 3.4 Leoj |

**Nepre ne ŝanĝu monon ĉe la privataj personoj.**

Eblas ŝanĝi monon en hotelaj monŝanĝejoj kaj en diversaj bankoj, kiuj estas malfermitaj labortage de lundo ĝis vendredo inter 9h00-16h00.

En la tuta lando funkcias diverstipaj aŭtomataj monŝanĝejoj (BANKOMAT), en kiuj oni povas uzi diversajn bankokartojn, uzitajn ĝenerale en Europo (Visa Card, Eurocard, Master Card, ktp.)

Rumana mono

La rumana pagilo estas LEO (RON)

Bankbiletoj estas en la jenaj valoroj: 500, 200, 100, 50, 10, 5 Lei kaj 1 Leu

Moneroj el metaloj : 50, 10, 5 bani kaj 1 ban.



## Telefono:

internacia prefikso de Rumanio: 00 4(0)…En Rumanio ekzistas la servo "Roaming" por ĉiuj komunikad-retoj per poŝtelefonoj. Ĉi tiu servo utilas ne nur en tuta Eŭropo sed ankaŭ ekster Eŭropo.La tarifoj estas tiuj de EU .

Oni povas telefoni el publikaj telefonniĉoj, plejparte per telefonkartoj, ege malofte per moneroj.En la niĉoj la piktogramo indikas la uzeblan sistemon (karto aŭ monero). La plej gravaj telefon-numeroj:

| | |
|---|---|
| Nacia (urĝaj aferoj) | 112 (senpage funkcias) |
| Enlanda informservo | 931 |
| Internacia informservo | 971 |

Interreto, senpaga en hoteloj." WI-FI" senpaga en centro: str. Republicii, mag. "STAR".

## Aĉetado

Labortage la magazenoj estas malfermitaj ĝenerale inter la 10h00-18h00, sabate ĝenerale inter la 9h00-13h00.Vendejo je la subtera etaĝo de centra magazeno "STAR" estas malfermita seninterrompe.

## Sanitara servo

S-inoj Cristina Aldeŝiu kaj Maria-Elena COCUZ, kuracistinoj, helpos vin laŭ bezono dum la kongreso. Iliaj telefon-numeroj troviĝas en la paĝo kiu prezentas OKK.

# "La Kalva Kantistino", Eugène Ionesco



La kvin aktoroj de la teatro "Eugen Ionescu" el Slatina, kiuj interpretas la spektaklon per legado de kelke da fragmentoj de "La kalva kantistino", interplektitaj kun vivanta muziko, ne estas parolantoj de la lingvo Esperanto. Sed ili estas tre talentaj kaj spertaj, do ili asimilis la informojn pri la senco kaj la elparolo de la vortoj de la grandkora kaj grandpacienca profesoro Doru Neagu, kies bonvolemo kuniĝis kun pasio kaj porarta sindonado.

La 30 minutoj de teksto, muziko kaj bildo ofertas subjekton de meditado pri la ankoraŭ nespertitaj ludaj kaj estetikaj dimensioj, kiujn povas provoki la interpretado de la Ionesco-a dramaturgio dediĉita al la absurdo.

Tiamaniere, la kultura memoro de la rumana teatro konservos ankaŭ ĉi tiun unikaĵon, prezentita - kie alie ol en Slatina, la naskiĝurbo de la dramaturgo - okaze de sia centa datreveno(2009): la interpretadon de la Ioneska teksto en esperanto.La traduko estas farita de George Lagrange kaj publikigita de TESPA en 1978.

"La Kalva Kantistino" restos la pruvo de la respekto kaj aprezo ne nur de la universala verko signita de Eugène Ionesco sed ankaŭ por la gravega kultura signifo de la praktikado de Esperanto.



Mihai Lungeanu, reĝisoro,
arta direktoro de la teatro Eugen Ionescu de Slatina

# La Karpata Cervo



La vidvino de iu estro de Braŝovo, Apollonia Hirsher, starigis tiun konstruaĵon por la braŝovaj komercistoj kaj metiistoj organizitaj en gildoj, inter la 1541-1547 jaroj.

Nuntempe ĉi tie troviĝas la vinejo "Karpata Cervo", kiu kreas por la turistoj kiuj alvenas el ĉiuj anguloj de la mondo unikan etoson pere de la gustumado de vinoj el la plej famaj vinberejoj de Rumanio, tradicia manĝaĵo kaj spektaklo de popolkantoj kaj dancoj.




# Gesto

Mi tenas vin enmane
Pro timo vin ne perdi
Sed mi sukcesas
nur dispremi vin.

Mi provis vin aprezi,
Enfermi vin en mia koro ŝtona,
Sed mi sukcesis
nur forperdi vin.

# La vojo de la poezio

Malnovaj ruinoj altiĝas
Kiel masko
Kiu kaŝas en sia sino
La poezion de l' muroj de pura mondo.
La poezion kiu montras la vojon
kiel la busolo de maljunulo,
La vojon al la abismo de l' feliĉo.

La poezio estas la sceptro ŝtelita
El la sanktejo de l' Daŭrado
Portita frumatene de gruo
Por facila enflugo
En la delikatan penson de mortemulo.



**Diana Laura Nohit**
*lernantino en Gimnazio nr. 25, Braŝovo*
*naskiĝdato: la 20-a de decembro 1996*

*Premioj:*
*I-a premio - Konkurso Anatol Ghermanschi, distrikta etapo, kategorio poezio*
*I-a premio - Konkurso de poezio "Mia urbo", organizita de Muzeo "Domo Baciu"*
*Speciala mencio - Konkurso Gellu Naum, Brezoi, nacia etapo, kategorio licea poezio*
*Tria premio - Lernejaj Olimpikoj pri la rumana lingvo "Ionel Teodoreanu"(2009 kaj 2010)*
*Tria premio - Interfaka konkurso "+/- poezio", distrikta etapo*
*II-a premio - Nacia konkurso pri poezio "Andrei Muresanu" (2009)*
*Premio "Excelsior" por la tuta verkaro en 2010, donita de Gimnazio nr. 25*

*Ŝiaj poezioj aperis en la rumanaj revuoj: "VATRA VECHE", "OBSERVATORUL CULTURAL" kaj "CUVÂNTUL LIBER"*

# La koruso de Gimnazio nr. 25



La koruso de Gimnazio nr. 25 enhavas 40 gelernantojn. Tiu koruso partoprenas intense al la kultura vivo de Braŝovo pere de lernejaj festoj, koncertoj, muzikaj festivaloj...

La repertuaro de la koruso estas nacia kaj internacia kaj, en la lasta tempo, ĝi prezentas ankaŭ esperantajn kanzonojn...ĉar plejparto de la geinfanoj komencis lerni de unu jaro ĉi-tiun lingvon.

prof. Cristina Mare

La gelernantoj de Gimnazio nr. 25 dum vizito de esperantisto Marc Cuffez, Belgio



# Kanzoneto !!!

Signifas la ĝojon kanti, fari la muzikon, sed ankaŭ la provon transdoni la ĝojon pluen, al la publiko !

Samtempe "Canzonetta" estas la daŭrigo de multkultura tradicio de la saksoj en Transilvanio.

La repertuaro de la grupo inkluzivas muzikajn kaj instrumentajn pecojn el diversaj epokoj de la muzikhistorio.



Ĉi tiu asembleo de solistoj kaj instrumentistoj konsistas el gelernantoj de Liceo "Johannes Honterus" kaj ĝi estis fondita de s-ino prof. Ingeborg Acker en la aŭtuno de la jaro 1994, sed la nomon "Canzonetta" ĝi portas apenaŭ el 1999.



Stimulitaj de la juneca entuziasmo kaj de la deziro ludi muzikon sendepende, la junaj "kanzonistoj" formis trupojn, kiuj dum la jaroj montris siajn valoron en multaj koncertoj.

„Canzonetta" havas aperojn precipe en Braŝovo, sed ankaŭ en multaj aliaj urboj de Transilvanio kaj Banato, kiel ankaŭ en Aŭstrio, Svislando kaj Germanio, kie ili prezentis koncertojn. Jam aperis kvar KD-oj, live-surbendigoj dum koncerto, kaj registrigo en studio.

La fakto, ke la tradicio kaj la moderneco interplektiĝas tiel harmonie en ilia repertuaro, kunportas novan kreivan forton en la interpretadon je aparta kvalita nivelo de tiu ĉi trupo de junuloj pasiigitaj de muziko.

prof. Ingeborg Acker
Liceo Johannes Honterus



# La duontaga ekskurso D 1
# Braŝovo - urbotrarigardo

- piedpromeno ĉirkaŭ la murego, kun ĉiĉerono
- dimanĉo, la 1-an de aŭgusto (13h30-16h00)

Bastiono de la Teksistoj- La konstrujaroj : 1421-1436 kaj 1570-1573

Estas unu el la ok bastionoj de la fortigita muro kiu ĉirkaŭas la internon de la citadelo de Braŝovo.

Konstruita por defendi la sudan parton de la citadelo, ĝi estas la plej bone konservita en sia originala formo, restinte neatingita de la granda incendio en 1689.

Altigita sur kvar niveloj de korporacio de la teksistoj, havante malplenajn spacojn por pafado, mazutbuŝojn kaj du gardturojn, la bastiono havas unikan arkitekturon enlande kaj en la sud-orienta Eŭropo.

La interno de la bastiono, kun grandnombraj galerioj sur du niveloj masive konstruitaj el kverkaj traboj, ĉirkaŭas korton kiu povis ŝirmi kelkajn centojn da korporacianoj kaj iliajn havaĵojn en la teruraj tempoj de la fremdaj invadoj.Tiu interna korto konservas la originalan pavimon el malgranda riverŝtono, kun borderaĵo geometrie dekoraciita.

Hodiaŭ la Bastiono de la Teksistoj ŝirmas, kadre de la Muzeo « Citadelo de Braŝovo », arkeologiajn kolektojn, mapojn pri la dakaj, romiaj, teŭtonaj kaj saksaj arkeologiaj esplorlokoj kaj la maketon (realigitan en 1896 j.) de la malnova citadelo de Braŝovo el la XV-a jarcento.



# La duontaga ekskurso D 3
# Braŝovo - urbotrarigardo



- piedpromeno tra la malnova urbo, kun ĉiĉerono
- lundo, la 2-an de aŭgusto(15h15-17h45)



Dum sia longa historio, Braŝovo konservis ekde arkeologiajn elfosaĵojn kaj mezepokajn postrestaĵojn, ĝis modernaj konstruaĵoj. Pluraj domoj havas sian rakonton pri politika, arta aŭ kultura vivo de la urbo. Pro la nuntempaj "Festotagoj de Braŝovo" okaze de la 755-a jaratesto de nia urbo, ni ĝuos apartan etoson de tiu ĉi unika evento.



# La duontaga ekskurso D 2
# Bran - Raŝnov - Poiana Braŝovo

- dimanĉo, la 1-an de aŭgusto (16h00-22h30)
- prezo: 30 € (kun vespermanĝo en tipe rumana restoracio "Coliba Haiducilor")



## Kastelo Bran - Historio kaj Legendo

Troviĝanta 30 kilometrojn sude de Braŝovo, en la montpasejo Rukar-Bran, inter Montoj Bucegi (Buĉeĝi) kaj Piatra Craiului (Reĝa Ŝtono), la kastelo estas grava historia monumento kaj gvidosigno de la rumana turismo.

Ĝi famas pro ĝia beleco kaj la ĉirkaŭanta pejzaĝo, sed ĝia famo ligiĝas ĉefe al la legendo de la Grafo Drakulo, kies spirito ankoraŭ hantas ĉi tiujn praajn regionojn.



## Fortikaĵo Raŝnov






## Poiana Braŝovo

Ripoz- kaj kuracloko permanenta, Poiana Braŝovo, situata 13 km for de Braŝovo, en la montaro Postavarul, estas la plej fama ripozloko por la vintraj sportoj en Rumanio kaj, samtempe, estas grava turisma centro internacia.

En tipe rumana etoso, ni amuziĝos per bonegaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, akompanataj de orkestro de popolmuziko.

# La duontaga ekskurso D 4 - Sinaia

- vendrede, la 6-an de aŭgusto (13h30-17h30)
- prezo : 18 € (sen manĝoj)

## Sinaia - La Perlo de Karpatoj

Situanta ĉe la malsuproj de la montoj Buĉeĝi, la ĉefurbo de la fama Prahova Valo - Sinaia - estas grava turisma centro, kie okazas prestiĝaj sciencaj kaj kultur-artismaj aranĝoj enlandaj kaj internaciaj.

Kastelo Peleŝ estas unu el plej interesaj kaj vizitataj rumanaj muzeoj. Ĝiaj salonoj, ĉambroj, koridoroj diversstilaj ofertas al la vizitantoj agrablajn surprizojn kaj la sinsekvo de diversaj stiloj estas vera leciono pri arto. La fajna meblaro, la speguloj de Murano, barokaj baldakenoj, la ĉambroj tapetitaj per Kordova ledo kaj mirindaj vitraloj estas altiraĵoj kiuj atendas tiujn, kiuj eniras en la fantastan mondon de tiuj internaĵoj. La biblioteko enhavas valorajn librojn kaj inkunablojn senprezajn, kaj la korto de la palaco havas multnombrajn statuajn grupojn, dignaj je liberaera muzeo.



Oni povas ankoraŭ viziti en Sinaia Kazinon, konstruitan en 1912 laŭ la modelo de la montekarla kazino kaj la Muzeon George Enescu (Georgo Enesku), vilao konstruita inter la jaroj 1921 – 1922 laŭ la planoj de la muzikisto, kie la plej fama rumana komponisto verkis parton de sia senmorta verkaro. Ĉi tie Enesku gastigis kaj instruis, dum tri sinsekvaj someroj, sian grandan amikon, Jehudi Menuhin.



Kaj oni povas viziti ankaŭ la monaĥejon "Endormiĝo de la Dipatrino", konstruitan inter 1690-1695, laŭ la modelo de la monaĥejo "Sankta Helena" sur la Monto Sinajo, de kie devenas la nomo de la urbo.

# La tuttaga ekskurso T 1- Sibiu, la urbo de A. Cseh

- merkredo, la 4-an de aŭgusto (08h00-19h00)
- prezo : 26 € (sen manĝoj inkluzivitaj)

## Sibiu - La kultura ĉefurbo de Europo en 2007

Per bone ekipitaj busoj ni forveturos frumatene 150 km okcidenten de Braŝovo, trapasante belegan regionon de la "Lando de Fagaraŝi" kaj alproksimiĝante suden la plej altan montaron inter la rumanaj Karpatoj, nome la Montaroj Făgăraŝj (altaj je 2543 m), kie la neĝo neniam malaperas kaj kie troviĝas multaj protektitaj regionoj.

Ni trapasos tre malnovan, historian, riĉan je eksponejoj de sia muzeo Monaĥejon Sâmbăta kaj post tri hora veturado, ni atingos la urbon Sibiu.



Por tagmanĝi, oni transportos nin al la fama loko nomata "La Dumbrava-Sibiu", kie eleganta restoracio ofertas specialan rumanan tagmanĝon, kun rumana vino. Poste ni vizitos la interesan "Muzeon de vilaĝo kaj popoltekniko". Nia vizito daŭros esplorante la centron de la urbo, kie troviĝas la fama Muzeo Brukenthal, la plej malnova en Rumanio. Ĝi enhavas ĉirkaŭ 100.000 da objektoj en kolektaĵoj de mezepokaj antikvaĵoj, mebloj, skulptaĵoj, pentraĵoj, ktp.



La urbo Sibiu, dank`al sia arkitektura heredaĵo, estas pritaksata kiel unu el la plej belaj kaj bone konservitaj historiaj urboj el Rumanio kaj Europo. La mezepoka fortikaĵo de la urbo restis nedetruita en la du mondmilitoj kaj gardas ankoraŭ la spiriton kaj la etoson de la pasintaj jarcentoj. La unua nacia muzeo estis inaŭgurita ĉi tie en 1817j., la unua societo pri muziko ekfunkciis en la jaro 1818. Sur la scenejoj de Sibiu koncertis famaj muzikistoj kiel Franz Liszt kaj Johann Strauss.En Sibiu troviĝas nun 2 teatroj, filharmonio, kineo, 5 bibliotekoj, pluraj kulturaj centroj kaj altlernejoj, 10 muzeoj, ktp.

Menciinde estas la fakto, ke ek de la jaro 1990, kadre de la Universitato funkcias Sekcio de AIS(Akademio Internacia de Sciencoj), kie oni studas Esperanton.En Sibiu loĝis Andreo Cseh, kreinto de la "rekta-metodo".

Pro la riĉeco de kultura, arta kaj tradicia heredaĵoj de Sibiu kaj de ĝiaj ĉirkaŭaĵoj ĝi estis elektita kiel la "kultura ĉefurbo de Europo" por la jaro 2007.

Post la vizito de la katedraloj, malnovaj stratoj, pontoj kaj turoj apartenantaj al la fortikaĵo, malfrue vespere, iomete lacaj sed, esperante, kun belegaj travivaĵoj, ni serĉos apartan lokon por vespermanĝi kaj samtempe "flari" la etoson de tiu romantika urbo.

Sibiu situas en la suda parto de Transilvanio, laŭlonge de la rivero Cibin, ege proksime de la geografia centro de Rumanio (sur la sama paralelo kiel la urbo Lyon, kaj la sama meridiano kiel Ateno). El historia vidpunkto, la unua atesto datumas el la jaro 1191, koncerne la alvenon kaj organizadon de la Teŭtonaj koloniistoj en la provinco.La nomo "Hermanstadt" troviĝis por la unua fojo en dokumento de la jaro 1366. Ek de la jaro 1919, la urbo nomiĝas Sibiu.

# Tuttaga ekskurso T 3 - Sighisoara

- sabate, la 7-an de aŭgusto, 9h00-18h00
- prezo : 25 € (sen manĝoj)



***Sighisoara***

estas la plej renoma mezepoka fortikaĵo ankoraŭ loĝata, kaj unu el la plej bone konservitaj. Ĝi estas inkluzivita en la liston de la monda heredaĵo de UNESCO.



***La Muzeo de Historio***

de Sighisoara estas aranĝita en la Horloĝturo, simbolo de tiu urbofortikaĵo.Ĝi estis konstruita en la XIV-a jarcento, por du celoj : por defendi la fortikaĵon kaj por doni lokon al la Urba Konsilio, al la arkivo kaj al la trezoro de la civito.





***La preĝejo sur monteto***

estas tutcerte la plej valora eklezia monumento de Sighisoara. Ĝi estas unu el la plej reprezentaj gotikaj konstruaĵoj en nia lando, la tria laŭ grandeco en Rumanio. La nuna preĝejo konstruiĝis sur romanika konstruo ekzistanta antaŭ ol 1200 j.

***La tegmentita ŝtuparo***

Konstruita el ligno, en 1662, laŭ la iniciato de la urbestro Eisenburger, por plifaciligi dumvintre la vojon de la lernantoj al la Lernejo sur monteto, la tegmentita ŝtuparo nomiĝas ankaŭ nun "Ŝtuparo de lernantoj". Origine ĝi havis 300 ŝtupojn tegmente protektitajn, sed sekve de modifoj en 1849 postrestis nur 175 ŝtupoj.



# La tuttaga ekskurso T 2 – Bukureŝto

- sabate, la 7-an de aŭgusto (08h00-19h00)
- prezo : 25 € (sen manĝoj inkluzivitaj, sen tranokto)
  45 € (kun tranokto 7/8.08)

## Bucuresti (Bukureŝto) – ĉefurbo klasika kaj moderna

Historie, la tria ĉefurba civito de Valakio post Curtea de Argeş (la Kortego de Arĝeŝ) kaj Târgovişte (Targoviŝte), dokumente atestita ekde la jaro 1459, Bukureŝto konservas ankoraŭ mezepokan kernon – Curtea Veche (la Malnova Kortego) – kie oni povas vidi restaĵojn de palaco kiu elvokas la figurojn de regnestroj kiuj famigis la rumanan historion : Mircea cel Bătrân – Mirĉo la Olda, Radu cel Frumos – Radu la Bela, Vlad Ţepeş – Vlad Cepeŝ, Mihai Viteazul – Miĥaelo la Brava, Constantin Brâncoveanu – Konstanteno Brinkoveanu.

Pli malfrue, ĉirkaŭ la jaro 1888, dum la kultura reviviĝo de la jarcento, grupo de intelektuloj starigis, en la centro de la urbo, salonon por publikaj konferencoj, ekspozicioj kaj koncertoj – la eleganta konstruaĵo de Ateneul Român – La Rumana Ateneo. Proksime estas la Universitato, memoriganta pri la regnestro Alexandru Ioan Cuza – Aleksandru Iono Kuza – dum kies regnestrado okazis, en 1859, la Unuiĝo de la Rumanaj Landoj. Inaŭgurita en 1869, la Universitato igis la urbon gestudenta centro, kiu produktis generaciojn de intelektuloj internacie konataj.





Estis, tiam, Bukureŝto altiginta belajn novklasikstilajn konstruaĵojn, kio alportis, kune kun rafinata etoso, la nomon de "malgranda Parizo". Inter la arkitekturaj gvidosignoj kiuj atestas tiun nomon, interesaj estas Casa de Economii şi Consemnaţiuni - La Palaco de la Ŝpardomo, Cercul Militar Naţional – Nacia Militista Rondo, Biblioteca Centrală Universitară – Universitata Centra Biblioteko, Palatul Regal – La Reĝa Palaco – gastiganta La Artan Nacian Muzeon de Rumanio, La Instituto pri Arkitekturo "Ion Mincu", Palatul Şuţu - La Palaco Ŝucu, kie troviĝas la Historia Muzeo de Bukareŝto, eksa Palaco de la Parlamento, najbare de la Rumana Patriarkejo.

Inter la gvidosignoj de la nuntempa Bukureŝto, estas kelkaj konstruaĵoj, ankaŭ ili emblemaj : La Palaco de la Parlamento – la dua en la mondo, post la Pentagono, el la konstruita volumvidpunkto, la hoteloj Intercontinental, Sofitel, Marriott ktp.

La vizitanto de Bukureŝto estos sorĉata dum iu ajn sezono de du unikaĵoj kiuj sigelas la urbon devenantan el pitoreska vilaĝa komunumo : la Muzeo de la Vilaĝo, sur la bordo de la lago Herăstrău, etnografia poetika sintezo de kamparanaj mastrumaĵoj kaj la Muzeo de la Rumana Kamparano, starigita de ĝia kreinto, la pentristo Horia Bernea, en tute originala maniero, pro kio li ricevis, en 1994, la premion „La plej bona eŭropa muzeo de la jaro".

# Braŝovo - Bukureŝto - Tulĉea - Delto de Danubo - Marbordo de la Nigra Maro - Murfatlar - Bukureŝto

**Sabate, 07.08.**

- 09h00 - forveturo per buso de Braŝovo - akcepto en Bukureŝto(hotelo): vizito de la urbo(parte buse), Muzeo de la Vilaĝo (liberaera), tranokto en Bukureŝto 7/8.08

Dimanĉe, 08.08,

- 06h00 - forveturo per buso al Tulĉea, deirpunkto por ekskurso en Delto de Danubo

**Dimanĉe, 8.08 (12h00) ĝis Merkrede, 11.08 (12h00)**

La Delto de Danubo, laŭ itinero, tranoktado sur hotelŝipo (8/9, 9/10, 10/11.08)

Vizito de unikaj rezervejoj de birdoj en Eŭropo (pelikanoj, cignoj, kormoranoj, ktp)

Nur tiu 4-taga ekskurso, kies komenco estas en Tulĉea, kostas 225 €.

La partoprenantoj devas interesiĝi memstare pri la vojaĝo tien kaj reen.

Renkontiĝo je la 12h00 en Tulĉea, ĉe hotelŝipo.

**Merkrede, 11.08**, postagmeze

- 12h00 -18h00 - vizito laŭlonge de la marbordo de la Nigra Maro
- vespermanĝo en la fama vinberejo Murfatlar, kun gustumado de vinoj
- reveno kaj tranokto en Bukureŝto 11/12.08





**Ĵaŭde - 12.08**

- 08h00 - 08h45 matenmanĝo
- 10h00 -14h00 vizito de la Palaco de la Parlamento
- 14h00 - libera programo

La prezo de la ekskurso, 7-12.08(6 tagojn): 340 €, inkluzivas:

- tranoktadon en Bukureŝto en du-litaj ĉambroj(du noktojn kun matenmanĝoj: 7/8 kaj 11/12.08)), vespermanĝon kun gustumado de vinoj en Murfatlar(11.08), enirbiletojn, busvojaĝon, mineralan akvon kaj kafon survoje, krozadon per hotelŝipo(ĉio inkluzivita) kiu disponas nur po 9 dulitajn ĉambrojn, moderne ekipitaj per duŝejo, necesejo, televido, aparatoj por refreŝigi la aeron kaj kontraŭ kuloj.

# Listo de aliĝintoj:

1. Jakvo SCHRAM, Belgio
2. Jacqueline POUX, Francio
3. Kristina KUJUNDZIC, Serbio
4. Jaroslava HUMPOVA, Ĉeĥio
5. Nikolao GUDSKOV, Rusio
6. Valentin SEGURU, Rusio
7. Angela TELLIER, Britio
8. David KELSO, Britio
9. Ronald LYNN, Britio
10. Jocelyne MONNERET, Francio
11. Robert PONTNAU, Francio
12. Bernard REIFFSTECK, Francio
13. Arturo PRENT, Britio
14. Franciska TOUBALE, Aŭstralio
15. Franjo LEVEQUE, Francio
16. Guy MARTIN, Francio
17. Vinko  MARKOVO, Francio
18. Lydie BLOCH, Francio
19. Colette WEISS, Francio
20. Andre WEISS, Francio
21. Vera MAREŜOVA, Ĉeĥio
22. Tsukuru HARADA, Japanio
23. Slobodanka STOJKOVIĈ, Serbio
24. Terezija KAPISTA, Serbio
25. Dragica MILANOVIĈ, Serbio
26. Miroslava KOMAD, Serbio
27. Bojana ALFIREVIĈ, Serbio
28. Bela KOVACS, Hu
29. Mariamagdolna KOVACS, Hu
30. Eduard KUSTERS, Belgio
31. Mira MAKIVIĈ, Bosnio kaj H.
32. Ksenija URDIH, Bosnio kaj H.
33. Petko DENEV, Bulgario
34. Svoboda DAMJANOVA, Bulgario
35. Stojanka DRAHNDEVA, Bulgario
36. Michael SEDGLEY, Bulgario
37. Eliane APCHER, Francio
38. Jongsoo AN, Korea Resp.
39. Kyungja KO, Korea Resp.
40. Milĉo BELORESKI, Bulgario
41. Vito MARKOVO, Francio
42. Paulo BRANKO, Litovio
43. Diemente ANCIENE, Litovio
44. Jean-Marc BLANCHAIS, Francio
45. Jose Maria SALGUERO, Hispanio
46. Carmen CIDONCHA, Hispanio
47. Ŝefik RIZVANOVIĈ, Bosnio kaj H.
48. Lahuec  THIERRY, Francio
49. Michele MILETTI, Italio
50. Marian CONSTANTINESCU, Bukureŝto, Ro
51. Iosif NAGY, Bukureŝto, Ro
52. Mihai TRIFOI, Bicsad-Olt, Ro
53. Cristian SABAU, Piteŝti, Ro
54. Alexiu-Atila MAKAY, Oradea, Ro
55. Emil TUDORACHE, Costeŝti-Arĝeŝ, Ro
56. Doru NEAGU, Slatina, Ro
57. Marian VOCHIN, Bukureŝto, Ro
58. Mihai LUNGEANU, Bukureŝto, Ro
59. Florica POPA, Timiŝoara, Ro
60. Elena URIAN, Braŝovo, Ro
61. Alexandru TIBULEAC, Braŝovo, Ro
62. Cristina MARE, Braŝovo, Ro
63. Ingeborg ACKER, Braŝovo, Ro
64. Rodica TODOR, Braŝovo, Ro
65. Rada VLAICA, Braŝovo, Ro
66. Cristina ALDESIU, Braŝovo, Ro
67. Maria Elena COCUZ, Braŝovo, Ro
68. Ileana CADAR, Bukureŝto, Ro
69. Mara TROFIN, Braŝovo, Ro
70. Gabriella TIBULEAC, Braŝovo, Ro
71. Mihaela MARCU, Braŝovo, Ro
72. Constantin MARCU, Braŝovo, Ro
73. Mariana LIPA, Braŝovo, Ro
74. Laszlo SCHRECK, Braŝovo, Ro
75. Iosif TATULEA, Braŝovo, Ro
76. Ana MIHAI, Bukureŝto, Ro
77. Sorin MIHAI, Bukureŝto, Ro
78. Rodica GIUHAT, Bukureŝto, Ro

Braŝovo, 15.07.2010

# Statistiko laŭ landoj

stato je la 15.07.2010

| | | |
|---|---|---|
| 1. | Aŭstralio | 1 |
| 2. | Belgio | 2 |
| 3. | Bosnio kaj Hercegovino | 3 |
| 4. | Britio | 4 |
| 5. | Bulgario | 5 |
| 6. | Ĉehio | 2 |
| 7. | Francio | 14 |
| 8. | Hispanio | 2 |
| 9. | Hungario | 2 |
| 10. | Italio | 1 |
| 11. | Japanio | 1 |
| 12. | Korea Resp. | 2 |
| 13. | Latvio | 2 |
| 14. | Rumanio | 29 |
| 15. | Rusio | 2 |
| 16. | Serbio | 6 |

el 16 landoj — 78 kongresanoj



# Dankojn...




Ni kore dankas al ĉiuj, kiuj helpis la OKK por organizi la kongreson:

...la urbestro de Braŝovo, George Scripcaru

...la prefekto de distrikto Braŝovo, Ion Gontea

...la Nacia Kolegio "Andrei Ŝaguna", dir. Mariana Ionescu

...la Muzeo Slatina, cerc. şt. drd. Laurenţiu-Gerard Guţică-Florescu kaj s-ro Doru Neagu

...s-ro Marian Vochin, por ekspozicio

...Teatro "E. Ionescu", Slatina, reĝisoro Mihai Lungeanu

...Gimnazio nr. 25, Braŝovo, prof. Mara Trofin, prof. Cristina Mare, dir. Rodica Gheorghisor

...Liceo Johannes Honterus, prof. Ingeborg Acker

...Revuo "Sapte Seri", dir. Valentin Vasiloiu, Laura Tibuleac – programoj kaj eventoj

...s-ino Maria Radu, direktorino de la firmao MLM "Lifestyle", kiu multe subtenis nin!

Specialajn korajn dankojn al ĉiuj kiuj helpis nin pri la libreto de la kongreso!!!

# VORTARETO





| | |
|---|---|
| banka aŭtomato | bancomat ( bankomat ) |
| banko | bancă ( bankă ) |
| bierejo | berărie |
| biero | bere |
| bildkarto | ilustrată |
| Bonan alvenon! | Bine ați (aci) venit! |
| Bonan apetiton! | Poftă bună! |
| Bonan matenon! | Bună dimineața! (Bună dimineaca!) |
| Bonan tagon! | Bună ziua! |
| Bonan vesperon! | Bună seara! |
| Bonvolu diri al mi, | Vă rog, spuneți-mi...(spuneci-mi...), |
| mi petas vin… | vă rog... |
| bufedo | Bufet |
| bushaltejo | stație (stacie) de autobuz |
| ĉambro | cameră (kameră) |
| Dankon! | Mulțumesc! (Mulcumesk!) |
| dolĉaĵejo | cofetărie (kofetărie) |
| domo(por logxi) | casă , locuință (lokuință) |
| dormi | a dormi |
| dua klaso | clasa (klasa) a doua |
| elirejo | ieşire (jeŝire) |
| enirejo | intrare |
| fromaĝo | brânză |
| Fumado malpermesita! | Fumatul interzis! |
| Ĝis revido! | La revedere! |
| hieraŭ | ieri (jerj) |
| hodiaŭ | astăzi |
| infano | copil (kopil) |
| Informejo | Informații (Informacii) |
| kafo | cafea (kafea) |
| kaso(por pagi) | casa (kasa) |
| Kiom kostas? | Cât costă? (Kât kostă?) |
| lakto | lapte |
| leterkesto | cutie de scrisori (kutie de skrisorj) |
| letero | scrisoare (skrisoare) |
| manĝi | a mânca (a mânka) |
| mineralakvo | apă minerală |
| monŝanĝejo | casă de schimb (kasă de skimb) valutar |
| morgaŭ | mâine |
| necesejo | W.C. |
| nutraĵvendejo | alimentara (magazin alimentar) |
| pano | pâine |
| posttagmezo | după amiază |
| poŝtmarko | timbru |
| prezo | preț (prec) |
| rapidtrajno | tren rapid |
| restoracio | restaurant |
| sidlokbileto | loc (lok) rezervat |
| stacidomo | gară |
| strato | stradă |
| supo | supă |
| tago | zi |
| tagmanĝo | prânz |
| taksio | taxi(taksi) |
| teo | ceai (ĉaj) |
| trajno | tren |
| trinki | a bea |
| tuttaga bileto | abonament |
| unua klaso | clasa (klasa) întâia |
| valizo | valiză |
| veki | a trezi |
| vendejo | magazin |
| vespermanĝo | cină (ĉină) |
| verdire | adevărat |
| vetero | vreme |
| veturbileto | bilet de călătorie (kălătorie) |
| vidi | a vedea |
| vino | vin |
| vojaĝi | a călători (a kălători) |
| volonte | cu plăcere (ku plăcere) |
| vortaro | dicționar(dikcionar) |